

INFORMA

bulteno

DE ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA

NOVEMBRO - DECEMBRO 1964 Numero 7 /69



*** 9.11.1890 RUDOLF HROMADA + 26.10.1964**

Duonhoron antaŭ la tagmezo, sabate la 31-an de oktobro 1964, kolektiĝis multaj homoj en laceremonia halo de krematorio en Praha-Motol. En tiu homamaso estis multaj esperantistoj, kiuj venis por adiaŭi malnovan nian membron kaj aktivulon, samideanon RUDOLF HROMADA, kiu mortis la 26-an de oktobro 1964. Katafalko estis ĉirkauita de tre multaj flordonacoj el kiuj tri grandaj florkronoj kun verdaj rubandoj estis antaŭe. Estis tiuj, per kiuj honorigis sian malnovan amikon Esperantista klubo en Praha, Universala Esperanto-Asocio kaj Esperantista klubo en Brno. Al membro Honora - Universala Esperanto-Asocio Rotterdam" oni povis legi sur la rubandoj de la plej granda el ili.

Adiaŭante neforgeseblan aktivulon parolis apud la ĉerko honora prezidanto de Esperantista klubo en Praha, ĉefdelegito de USA, s-ano Jaroslav Šustr:

"Kune kun vi, estimataj ĉeestantoj, kiuj venis por adiaŭi sinjoron Rudolf Hromada, adiaŭas lin ĉi tie Universala Esperanto-Asocio kaj Esperantista klubo en Praha. Tiuj societoj perdas en la mortinto sian honoran membron.

Vere, la vivo ne povis starigi min antaŭ pli malfacilan taskon ol estas tiu, ke ĉi tie, en ĉi tiu halo de adiaŭado - kie oni neniam iun bonvenigas, sed kie oni por ĉiam adiaŭas, ke mi ĉi tie adiaŭu kaj honorigu tiun, kiu al ni, esperantistoj, tiom alkoriĝis! Niaj koroj hodiaŭ de doloro tremas ĉe nura konscio, ke ĉi tiu, dum longaj jaroj tiom aktiva kaj oferema funkciulo neniam plu revenos al sia amata laboro. Neniam plu mi povos voki lin telefone okaze de ofta bezono de urĝaj informoj aŭ liaj opinioj, kiel ofte okazadis. Neniam plu mi povos peti deli konsilon aŭ helpon. Neniam plu mi aŭdos lian voĉon! Rudolf Hromada plugis sur la kampo esperanta sulkon tiel grandan, ke ni apenaŭ trovas sur la mondo al ĝi similan.

Sian aktivecon por internacia helpa interkomprenigilo Esperanto komencis Rudolf Hromada iam kiel studento 17-jara. Kun la jaroj kreskis lia aktiveco, kiu evoluigis ĉiudirekten. Rudolf Hromada fariĝis ne nur membro de la komitato de Esperantista klubo en Praha, sed ankaŭ komitatano de UEA. Li estis membro de ICK, membro de Akademio kaj de aliaj korporacioj. Dum longaj jaroj li funkciis kiel ĝenerala sekretario de CAE. Li estis redaktoro, eldonisto, instruisto, ekzamenatoro, gvida personeco de nia movado. Li estis verkisto, poeto kaj eminenta tradukisto de ĉeĥa poezio, kiun li tiamaniere diskonigadis tra la tuta mondo, inter ĉiuj popoloj. Liaj poeziaj tradukoj de Bezruč, Toman, Sova, Vrchlický, Machar, Neruda, Neumann, Šrámek kaj aliaj estas tiel multaj, ke ni vere ne scias, ĉu ni sukcesus ilin ĉiujn ko- lekti. Multaj el ili ja aperis malproksime, tre malproksime de la mondo kaj reprezentis ĉeĥan poeion en tiuj landoj malproksimaj. Ne ekzistas aktiveco en kiu ne estus nia Hromada partopreninta - se li mem ne estis ĝia iniciatinto.

La plej grandan laboron li faris kiel nia vortaristo. Dum lia vivo presis kelkaj el liaj vortaroj, sed vortaro la plej granda, en manuskripto atendas sian eldonon. Pli ol duonjcenton, precize 57 jarojn, daŭris lia laboro por efektiviĝo de la plej granda porpaca ideo, kiu iam en la

kapoj de homaro kreigis. Ĉiam li estia konvinkita pri ĝusteco de tiu vojo. Neniam li ekhezitis, neniam li dubis, eĉ ne iomete! En tio li estis por ni brila ekzemplo.

Mi volas al vi danki, samideano Hromada! Mi volas danki al vi por ĉio, kion vi por nia movado kaj lingvo Esperanto faris. Mi dankas al vi ne nur en la nomo de Universala Esperanto-Asocio, en la nomo de Esperantista klubo en Praha kaj de Esperantista klubo en Brno, kiuj min por tio komisiis, sed ankaŭ en la nomo de esperantistaro tutmonda.

Se vi, mortante havis eble impreson, ke via torĉo de verda lumo elfalis el via mano, mi volas certigi vin, ke tiam vi eraris. Tiel ne okazis! Ni ne lasis ĝin terenfali, sed alten ĝin levante, ni portas la flagon verdan, kaj portos ĝin ĝis plena ĝia venko!"

Jaroslav Šustr, ĉefdelegito de UEA kaj honora prezidanto de EKP

LA REDAKCIO ANONCAS

■ En nia lasta "Informa Bulteno" ni informis, ke la poemo "Fontanoj de Olomouc" estis pere de Esperanto tradukita en plurajn naciajn lingvojn. Post la aperigo de tiu ĉi "I.B." ni ricevis de Radio-Praha sciigon, ke la germanlingva traduko, verkita de s-ano Leo Joliett el Wiesbaden, estis de Radio-Praha en la programoj por Germanujo en tiuj ĉi tagoj disaŭdigita. Ni gratulas al esperantlingva tradukisto s-ano Kořínek kaj al germanlingva tradukisto s-ano Joliett.

■ Ni estis informitaj pri ĝi. (Ĝi estis talismano. Post fuŝuzo ĝi estis anstataŭigita per alispeca. La origina talismano eble perdiĝis, eble ĝi estis perdigita. Pri ĝi kaj pri sortoj de homoj ĉirkau ĝi vi baldaŭ povos legi en pretigata romano el societa vivo: "KE NE PALU OMBRO" /"Ringo kun skarabo"/, kies originalo estas esperantlingva. En iu el venontaj "I.B." aperos parto el unu epizodo de tiu ĉi romano.

EL NIA KLUBA LABORO

La 20-an de novembro okazis kunveno de la kluba laborkomitato, kiun ne ĉeestis invititaj reprezentantoj de OKD-1 /Regiona Kultura Domo/.

Programo:

1. raporto pri klubaj laboroj en la I-a, II-a kaj la III-a kvaronjaroj 1964 /la prezidanto/;
2. la laborplano en 1965 /la sekretario/;
3. pri klubaj junularoj /s-ano Nevan/;
4. pri lingva kurso organizita de OKD-1 /s-ano Slanina/;
5. solvitaj kaj nesolvitaj demandoj de kunlaboro kun OKD-1 dum 1963-1964 /k-dino Semlerová/;
6. perspektivoj de kunlaboro kun OKD-1 en 1965 /k-dino Herodková/;
7. liberaj proponoj.

En sia referato resumis la prezidanto kluban laboron dum la naŭ pasintaj monatoj 1964. El lia raporto ni notis:

Je la 30-a de septembro 1964 havis la klubo 234 membrojn, okazis 39 regulaj kunvenoj /2 eksterordinaraj/, kiujn vizitis 2049 geklubanoj kaj ĉeĥoslovakaj samideanoj el aliaj kluboj, kaj 71 eksterlandaj gastoj el 16 landoj. Meznombra partoprenado estis 52,5, kio kompare kion la sama periodo 1962 reprezentas duoblon. Kvankam la estraranoj klopodis, ke la klubaj programoj estu ĉiam bone preparataj, tamen ili ne ĉiam sukcesis, ofte eĉ pro tio, ke ne estas eble ĉiam ĉiun kontentigi, sed el la spertoj ĉerpos la estraro por la venonta jaro. Kiam en la dua kvaronjaro ekestis kelkaj malfacilaĵoj, tuj ilin pritraktis reprezentantoj de OKD-1 kaj

de la Klubo. Kejkaj problemoj estis solvitaj, kelkaj ĝis la hodiaŭa tago ne. Malgraŭ tiuj ĉi malfacilaĵoj tamen estis atingita unu grava celo. Nome post longaj jaroj eklaboris denove junulara grupo. Ĉi-jare planita E-ekspozicio bedaŭrinde ne okazis, ĉar OKD-1 ne povis doni je dispono necesan ejon. Ĉar la materialo por la ekspozicio estas je mano, ni espru, ke la ekspozicio okazos dum someraj monatoj 1965 - kio dependas de OKD-1 - kiam nian ĉefurbon vizitos multaj eksterlandaj gastoj okaze de la III-a Tutŝtata Spartakiado kaj el esperantistoj tiuj, kiuj veturos al aŭ estos revenantaj el VienaEŭropa Esperanto-Konferenco.

Fine de sia referato konstatis la prezidanto, ke pri la kluba laboro ni povas, paroli kiel pri suk- cesa kaj progresita, nur beaŭrinda fakto estas, ke nur kvarono el la nombro de niaj geklubanoj regule kunvenadas. Same bedaŭrinda fakto estas, ke ankaŭ 57 membroj ne pagis kluban kotizon por la jaro 1964 /rimarko de la redakcio: la sama situacio estas kun "I.B." kaj tiuj nepagantoj faras grandajn zorgojn al nia kasistino s-ano Bárocbová/.

La kluba sekretario, s-ano Pražák, informis la ĉeestantojn pri la kluba laborplano en la jaro 1965, pri kiu vi povos legi en la venonta numero de "I.B.". S-ano Nean, kiu instruas la lingvon en nia junulara grupo kaj kiu ĝin samtempe organizas, raportis pri sia laboro. Pri la E-kurso por komencantoj, organizita de OKD-1, raportis s-ano Slanina, vicprezidanto de EKP, kiu en la kurso instruas. La kurson samtempe frekventas 31 personoj /studentoj, laboristoj, metilernantoj, ofioistoj kaj teknikaj laboruloj/. Tiu ĉi E-kurso okazas ĉiun jaŭdon de la 18-a ĝis la 20-a h. en klubejo de OKD-1 en Benediktská str.16, Praha 1. Multaj el ĝiaj frekventantoj jam aliĝis al nia Klubo por la jaro 1965.

Ĉar sekve de organizaj kaj personaj alternigoj en OKD-1 anstataŭigis en la metodika funkcio kamaradinon Semlerová k-dino Herodková, estis ili ambaŭ invititaj; k-dino Herodková ne povis veni pro malsano, k-dino Semlerová ne venis.

La diskuton partoprenis preskaŭ ĉiuj ĉeestintaj samideanoj.

EKP

Večerní Praha

la 30.11.64 recenzas ilian artikolon pri R. Friml en "IB" 6/64 kaj finas: "Informa Bulteno estas dissendata en 40 landojn. En serio de artikoloj, kiujn dum la lastaj du jaroj la bulteno aperigis pri kulturo, historio kaj interesaĵoj el Ĉeĥoslovakio, ĝi kontribuis al bona propagando de nia patrujo malproksime en eksterlando."

■ SCIIGO EI ST. BOHUMÍN.

De la 24—a - la 26-a de oktobro 1964 estis aranĝita en St. Bohumín la Esperanto-ekspozicio sub la titolo: "Infanaĵo desegnaĵoj el eksterlando". La ekspozicio havis sukceson ne nur inter la gelernantoj de loka fundamenta naŭjara lernejo, sed ankaŭ inter la plenkreskulo, iuj ĝin vizitis en sufiĉa nombro.

ESPERANTO V GEOLOGII

(ESPERANTO EN GEOLOGIO)

surskribas la 10-a numero de fake scienca revuo "Geologický průzkum" /"Geologia esplorado"/ longan artikolon.

La artikolo enkonduke informas, ke "Informa Bulteno" de Esperantista klubo en Praha /n-roj 2/63 kaj 6/64/ aperigis artikoletojn kun titoloj: "KRAJONOJ, SPERTO, INTERPAROLADO, PLIBONIGO" kaj "ĈU GORDIA NODO EL KOLORAJ GRAFITOJ?" kaj samtempe alvokon, ke samideanoj sendadu al "GE" informojn pri esploroj kaj pri novaĵoj sur geologia kampo.

La redakcio de "GE" jam ricevis multajn leterojn de esperantistoj. S-ano Josef Kavka informis la redakcion pri sia scienca artikolo "A1 la difino, klasado kaj nomenklaturado de la fonolicetaj vulkanrokoj" aperinta esperantlingve en "Acta Universitatis Carolinae - Geologica - n-ro 1, paĝ. 43-59" kaj pri alia artikolo aperinta en Montevideo /Urugvajo/ sub la titolo "Pri la subakvaj vulkanfenomenoj de la Nordbohemia terciara lagbaseno". S-ano Daglio el Italio sendis al la redakcio de "GE" unu numeron de esperantista stenografa gazeto "Intersteno", en kiu aperis artikolo pri interesa informo el astronomio, kiu rilatas la lunan geologion ktp.

Denove montriĝas, ke Esperanto grave servas kiel internacia lingvo sur ĉiuj sciencaj kampoj kaj nin ĝojas, ke nia "I.B." povis kontaktigi la redakcion de "GE" kun fakuloj kaj ke niaj artikoletoj kaj nia alvoko jam alportis unuajn fruktojn.

Samideanoj, eluzu ĉiun eblecon kaj ĉiam dokumentu, ke Esperanto ne estas amokupo de kelkaj unuopuloj, sed ke ĝi estas ideala ligilo de nomoj serĉantaj veran amikecon, fakajn sciaĵojn kaj internacian interkompreniĝon.

La 8-a Internacia Seminario de GEJ

En tagoj de la 27-a de decembro 1964 ĝis la 3-a de januaro 1965 okazos en la junulargastejo de la Imperiestra kastelo en Nurnberg la 8-a internacia seminario de Germana Esperanto-Junuloj. Temo de la Seminario estas ideologio kaj Ŝtato - reciproka influo, realaĵoj kaj mitoj". Prelegantoj estos: Prof. D-ro Ivo Lapenna, /Anglujo/, prof. Lucien Laurat /Francujo/, docento el Bulgario /nomo ankoraŭ neanoncita/, D-ro inĝ. Giordano Azzi /Italujo/, Ivo Osibov /Jugoslavio/, stud-prof. Ludwig Thalmaier /Germanujo/, Dieter Gernert /Germanujo/, Edwin Thomas /Svislando/ kaj Dieter Meiners /Germanujo/.

Krom la prelegoj kun diskutoj estas preparataj pluaj programoj: Zamenhofa vespero, publika manifestacio, oficialaj akceptoj, novjara promenado en la ĉirkaŭaĵo, filmoj ktp. Kompreneble denove estos la tradicia Silvestra balo.

Ankaŭ okazos kunsidoj de la delegitaro, Centra Komisiono kaj estraro de GEJ kaj de la estraro de TEJO.

Dum aŭ post la Seminario okazos unutaga seminario por gvidantoj sub la titolo: "La laboro de la landaj sekcioj-kaj iliaj rilatoj kun TEJO", kiu celos progresigi la edukadon de junaj gvidantoj en la landaj sekcioj de TEJO.

Informoj kaj aliĝiloj: GERMANA ESPERANTO-ASOCIO, Postfach 2113,85,Nurnberg 2.

KORESPONDI DEZIRAS

JAPANUJO:

" SEIKO IŜIKAUJA, Iwat o 448,Komaeĉo Ki- tatema - Gun,Tokio, 17-jara studenti- no dez. korespondi.

SOVETUNIO :

" ALEXANDR DOBROVIN, ul.Lenina 8, Ga- lic, Kastromskaja obl., 25-jara laboristo dez. kor. kun ĉiuj landoj.

" SKVORCOVA ZOJA.-Galaktionovskaja 56, 6,Kujbiŝev 10, serĉas korespondantojn por novaj esperantistoj.

" A. DOVBIS, Korolenko 43-3, Sostka, Sumsk.obl., 21-jara artisto, filatelisto kaj stenografisto dez. kor.

*Al ĉiuj niaj legantoj
ni deziras sukcesplenan jaron*

1 9 6 5

REDAKCIO de „IB“

NI ATENTIGAS NIAJN KONTRIBUANTOJN

Kontribuantoj el ĉeĥoslovakio sendadu manuskriptojn por "I.B." al la redakcio en kvar ĉeĥ-lingvaj kaj en du esperantlingvaj ekzempleroj.

Eksterlandaj samideanoj skribu kompreneble nur en Esperanto. La manuskriptoj devas esti klare tajpitaj en korekta Esperanto. Oni skribu sur unu flanko de la papero /A4/ kun interlinia spaco kaj kun sufiĉe granda maldekstra margeno por eventualaj korektoj. La redakcio atentigas, ke rezervas al si rajton mallongigi aŭ alimaniere adapti ricevitajn artikolojn laŭ sia bontrovo.

"INFORMA BULTENO" de Esperantista klubo en Praha - fakrondeto ĉe Obvodní kulturní dům ONV 1, Praha 1. Respondeca: Miloš Rudolf. Teknika redakcio: Vl. Pražák. Lingva redakcio: A. Slanina. Aperas laŭbezon. Adreso: "ESPERANTO" P.B.1108, Praha 1, Ĉeĥoslovakio. Ĉiuvendrede de la 20-a ĝis la 22-a horo telefonu: 22 65 14.
ST 1X9, 808/64